

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2018. №6

**Speciala numero
okaze de la 60-jariĝo
de Aleksander Korĵenkov**



Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2018. №6 (284)

Ekde 2017 *La Ondo de Esperanto* aperas nur elektronike, kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiumonate, krom aŭgusto. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redaktas: Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj: Peter Baláž, István Ertl, Paweł Fischer-Kotowski, Irina Gonĉarova, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Moĵajevo, Sergio Pokrovskij

Redaktoro de ĉi tiu numero: Paweł Fischer-Kotowski

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Retpoŝtaj adresoj: sezonoj@kanet.ru, laondodeesperanto@gmail.com

Retejoj: <http://esperanto-ondo.ru>, <http://sezonoj.ru>

Perantoj. Vidu la liston sur p. 70-71.

Abontarifo por 2018

Internacia eŭra tarifo: 15 eŭroj

Internacia dolara tarifo: 17 usonaj dolaroj

Ruslando kaj Belarusio: 750 ruslandaj rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (3000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (900 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (600 rubloj)

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto «avko-u» ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represoj: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2018, №6 (284).

Ежемесячный журнал на языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ №77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 4 июня 2018 г.

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i>	2
En ĉi tiu numero	3
Jubilee	4
lom pri la jubileanto.....	5
Intervjue	6
Paweł Fischer-Kotowski. "La vivo de Zamenhof ĉiam fascinis min": Intervjuo kun Aleksander Korĵenkov	8
Beletre	16
Valentin Melnikov. "Surfadas AlKo sur la Ondo...".....	17
István Ertl. La tago likas	17
Gyula Illyés. Unu frazo pri la tiraneco (Tradukis Giorgio Silfer)	18
Probal Dasgupta. Dialogo pri malpalaca esperantismo	20
Artikole kaj esee	23
Humphrey Tonkin. Transformiĝoj	24
El gratuloj... (Grigorij Arosev, Probal Dasgupta, István Ertl)	26
Ilona Koutny. Esperanta kulturo kaj ĝia speguliĝo en la lingvo	27
Trevor Steele. Noblaj sovaĝuloj	31
Grigorij Arosev. Kiu efektive konkuras kun UEA?.....	33
El gratuloj... (Trevor Steele)	34
Dennis Keefe. La Esperanta printempo de Madrido 1980: Kazostudo pri unu nova lernanto de Esperanto kun merkatakaj kaj edukaj komentoj	35
Georgi Mihalkov. Ponto por interŝanĝo de kulturaj valoroj.....	44
El gratuloj... (Dennis Keefe, Julian Modest, István Nemere, Spomenka Štítec).....	46
Sergio Pokrovskij. Tiuj ĝenaj homonimoj homogenaj.....	47
Aleksander Korĵenkov. "Okaze de mia sesdeka naskiĝdatreveno...".....	48
Stanislavo Belov. Rakontu al infanoj pri Holokaŭsto!.....	49
Bibliografie	52
Bibliografio de Aleksander Korĵenkov (2).....	53
Kiel aboni <i>La Ondon</i>	70

En ĉi tiu *Ondo* mankas la kutimaj rubrikoj. Ĝi estas "festgazeto" (koncepte simila al "festlibro"), en kiu oni povas konatiĝi kun la vivo kaj verkoj de la jubileanta redaktoro de nia gazeto, kaj ankaŭ legi beletraĵojn kaj artikolojn, kiujn malavare donacis pluraj kunlaborantoj de *La Ondo*.

La eldonanto kaj la redaktoro de *La Ondo* dankas al Paŭlo Fischer-Kotowski, kiu akceptis redakti ĉi tiun specialan numeron kaj per tio ebligis al ni ĝui agrablan dektan feriadon okaze de la 60-jariĝo de l' "ĉefredo".

Kovropaĝo: La insulo de Kantio en Kaliningrado (*Foto: Halina Gorecka*).

Jubilee




Aleksandro trijara (1961)

Aleksander Korĵenkov – ĵurnalisto, eldonisto kaj antaŭ ĉio la redaktoro de *La Ondo de Esperanto*, antaŭ kelkaj tagoj – la 23an de majo 2018 – festis sian sesdekjariĝon. Ĉi tiu speciala numero de la magazino estas dediĉita al la jubileanto.

Iom pri la jubileanto

Aleksander Korĵenkov (ruse: Александр Викторович Корженков, pron.: kaŝin-kóŝj) naskiĝis la 23an de majo 1958 en Kamyŝlov (Камышлов, Sverdlovska reg., USSR) en la familio de fervojisto Viktor Tiĥonoviĉ Korĵenkov (1930-1998) kaj instruistino Zinaida Vasiljevna Korĵenkova (denaske: Loskutova; 1930-2014). Lernis en mezlernejoj de Kamyŝlov (1965-73) kaj Tjumeno (1973-75), kie fine de 1972 eklaboris la patro; en 1975 abiturientiĝis kaj studentiĝis en la pipelina fakultato de Tjumena Industria Instituto.



En 1980 A. Korĵenkov diplomiĝis kiel inĝeniero pri konstruado de gasduktoj, naftoduktoj kaj de konservejoj por gaso kaj nafto kaj eklaboris kiel inĝeniero en la projekta instituto Giprotjumenneftegaz en Tjumeno; post tri jaroj maldungiĝis kaj dum pli ol unu jaro vivtenis sin per hazardaj laboroj. Ekde decembro 1984 ĝis

novembro 1991 laboris kiel inĝeniero en la konstrua trusto Uralspecstrojtransgaz (kadre de la gasindustria ministerio kiu poste transformiĝis al Gazprom) en Sverdlovsk (nun: Jekaterinburg). Ekde novembro 1991 ĝis nun profesie laboras per Esperanto kiel ĵurnalisto, redaktoro, tradukisto kaj eldonisto. En 2001 trasloĝiĝis al Kaliningrado, kie nun loĝas kun siaj edzino kaj filo.

Du fratinoj: Natalja (1955-1957), Olga (1964-1984); frato Jurij (1964-). En 1980 Aleksander edziĝis kun biologino Natalja Kacer (1958-); filino Tatjana (1981-), tradukistino; divorcis en 1984. En 1986 edziĝis kun komputistino Halina Gorecka (1959-); filo Aleksej (1989-), mikrobiologo.

A. Korĵenkov eklernis Esperanton en septembro 1976 en vespera kurso ĉe la fervojista kulturpalaco de Tjumen; finis la kurson en aprilo 1977. Ofte prelegis kaj artikolis pri Esperanto, instruis la lingvon en elementaj, daŭrigaj, konversaciaj kaj superaj (vespera Esperanto-universitato) kursoj. Kunorganizis dekojn da esperantistaj renkontiĝoj kaj kongresoj. Aktivis en la Esperanto-movado en ĉiuj niveloj (loke, regione, lande, internacie, fake kaj kulture), i.a., kiel komitatano de UEA (1995-2004), vicprezidanto (1992-1995) kaj estrarano (1992-2001, 2008-2011) de TEĴA, vicprezidanto de Ruslanda Esperanto-Asocio (1992-94), prezidanto de Rusia Esperantista Unio (1995-1997).

En 1984 A. Korĵenkov lanĉis kaj redaktis (№1-22) la kulturan almanakon *Sezonoj* (1984-1990), kelkfoje redaktis la Uralan informilon *Ekzakte*, redakciano de *Ruslanda Esperantisto* (1991-2001), redaktoro de *La Ondo de Esperanto* ekde ĝia lanĉo (1991) ĝis nun (284 numeroj). Verkis pli ol mil artikolojn, eseojn, recenzojn, beletrajn tradukojn k. a., kiuj aperis en la nomitaj gazetoj, en *Budapeŝta Informilo*, *Heroldo de Esperanto*, *Hungara Vivo*, *Informilo por Interlingvistoj*, *Internacia Ĵurnalisto*, *Literatura Foiro* kaj en aliaj Esperantaj gazetoj. En 2008 kun H. Gorecka kunfondis la podkaston *Radio Esperanto* (ĝis nun aperis 43 sonprogramoj), en 2010 lanĉis kaj ĝis nun redaktas la novaĵretejon *La Balta Ondo* (pli ol 1600 afiŝoj aperis).

Ekde 1982 A. Korĵenkov eldonis kun H. Gorecka 120 librojn en/pri Esperanto, inter kiuj estas ankaŭ liaj propraj libroj originalaj kaj tradukitaj, interalie, *Historio de Esperanto* (2005), *Homarano* (2009, 2011) kaj *Nia Diligenta Kolegaro* (Kun H. Gorecka, 2018). Dum longa tempo okupiĝas pri bibliografio kaj historio de Esperanto; pri ĉi tiuj kaj aliaj temoj li pli ol centfoje prelegis en esperantistaj kongresoj kaj renkontiĝoj; gastprofesoras pri la historio de Esperanto en la Interlingvistikaj Studoj ĉe Universitato Adam Mickiewicz en Poznano (Pollando).

En 2009 A. Korĵenkov estis proklamita la Esperantisto de la Jaro “pro la ampleksa kaj zorga esplorado de la vivo, verkoj kaj ideoj de Zamenhof kaj pro tiutemaj verkoj kaj prelegoj, speciale pro la libro *Homarano*, aperinta okaze de la 94a Universala Kongreso de Esperanto en Bjalistoko”. En 2010 A. Korĵenkov kaj H. Gorecka ricevis la Esperanto-kulturpremion de la FAME-fondaĵo kaj la urbo Aalen.

Intervjuo



En la Esperanto-klubo "Revo" (Tjumen, 1978)

“La vivo de Zamenhof ĉiam fascinis min, kaj pretigante mian propran verkon *Historio de Esperanto* kaj la antologion de Zamenhofaj verkoj *Mi estas homo* (MEH), mi konsternite vidis, ke neniuj ĝisnuna biografio adekvate prezentis la ideojn de Zamenhof ...”, – Aleksander Korĵenkov rakontas pri sia malkovro de Esperanto kaj la postaj okupoj pri la lingvo.

La vivo de Zamenhof ĉiam fascinis min

Inter la pluraj taskoj la jubileanto trovis tempon por respondi kelkajn demandojn kaj rakonti al la legantoj ne nur pri la aktualaĵoj de la Esperanto-vivo, sed ĉi-foje iom pri la propra vivo – privata kaj profesia, pri sia esperantistiĝo kaj la interesiĝo pri la Zamenhofaj ideoj. Ĉu vi sciis, ke iam li eĉ eklaboris pri sia propra projekto de nova planlingvo?

Kiam kaj kiel vi eksciis pri Esperanto? Pro kio vi lernis ĝin?

Mia patro bonŝance sukcesis aboni la 12-voluman *Porinfanan enciklopedion* (Детская энциклопедия, 1964-1969), kiu – malsimile al la nunaj similtitolaj enciklopedioj – konsistis plejparte el seriozaj artikoloj, verkitaj ne por amuzi, sed por instrui. La antaŭlastan volumon “Lingvo kaj literaturo”, aperintan en 1968, komencis la artikolo “Lingvo kaj socio” de Viktor Grigorjev, konata filologo, interlingvisto kaj esperantisto (cetere, la ĉapitron pri la lingvoj de sovetiaj popoloj verkis Magomet Isajev, kaj Jevgenij Bokarjov estis unu el la tri sciencaj redaktoroj de l’ volumo). Ĉi tiu artikolo finiĝis per pozitiva prezento de Esperanto.

La ideo de planlingvo fascinis min, tiam dekjaraĝan lernanton en la kvara lernojaro, kaj por scii pli multe pri tiu mistera Esperanto mi iris al la urba biblioteko por lernejoj, sed en ĝi estis neniuj libroj pri Esperanto. En mia infana menso naskiĝis la bildo de Esperanto kiel intelekta ludo por saĝuloj. Mi imagis min saĝulo, prenis en la biblioteka legejo kelkajn rusajn-fremdlingvajn vortarojn (en la Sovetuniaj mezlernejoj oni komencis instrui la fremdajn lingvojn nur ekde la kvina lernojaro) kaj kopiis el ili la nomojn de la bazaj numeraloj kaj de la personaj pronomoj kaj ekstemporalis ion mezan inter la slavaj, ĝermanaj kaj latinidaj vortoj (on, dva, tri, kvart, kvint...). Ĉi tiu halanĝo estis mia unua kaj – feliĉe! – la lasta provo en la sfero de la lingvoprojektado. Poste aliaj ideoj ombris kaj forgesigis Esperanton, kiun mi rememoris nur refoliumante la enciklopedion.

Mia dua kontakto kun Esperanto okazis en aŭtuno 1975, kiam mi studentiĝis en Tjumenia Industria Instituto. La loka Esperanto-klubo Revo decidis “konkeri” la urban studentaron per vasta informado, kaj kelkaj el miaj samfakultatanoj aliĝis al la kurso kaj plezure intersalutis sin Esperante, sed preskaŭ ĉiuj baldaŭ forlasis la nefinlernitan lingvon kaj plonĝis en aliajn hobiajn. Post unu jaro la kampanjo ripetiĝis, kaj mi decidis eklerni ĉi tiun laŭmodan lingvon simple pro scivolemo, sen konkreta celo, sciante ke mi apenaŭ havos la ŝancon uzi ĝin praktike en konversacio, ĉar mi ne kredis, ke iam mi vizitos eksterlandon kaj ĉar nia landoparto estis fermita por alilandaj turistoj. Do, en oktobro 1976 mi iĝis unu inter ducent aliĝintoj al vespera kurso de Esperanto ĉe la fervojista kulturpalaco en Tjumeno.

Kiu estis la unua libro en Esperanto, kiun vi legis?

Ĉar lernolibroj de Esperanto por ruslingvanoj tiutempe ne aĉeteblis, nia grup-instruisto Aleksandr Kalaŝnikov instruis sen lernolibro kaj cirkuligis dum la lecionoj la lernolibron por estonoj *Esperanto keele õpik* de Jaan Ojalo, kaj mi scias, ke la unua teksteto en Esperanto, kiun mi legis (ni laŭvice voĉlegis), havis la titolon *Uno kaj lia patrino*. Ne kredu, ke mi ĵus facile rememoris tion, kion mi legis antaŭ 41 jaroj, kvankam ĉi tiun lernolibron mi aĉetis tri monatojn post la kursfino en mia unua esperantista tendaro OrSEJT-19 ĉe la bela lago Turgojak en Suda Uralo kaj poste plurfoje tralegis ĉiujn legotekstojn kaj la librofinan krestomatieton – ĉe respondo al via demando mi elbretigis ĉi libron kaj vidis la tekston de kiu komenciĝis mia legista kariero en Esperanto.

En la menciita ĉelaga tendaro funkciis eta libroservo, kaj mi aĉetis kelkajn lernil-ilojn kaj tri librojn en Esperanto. El ĉi tiuj tri mi tuj tralegis la tipe sovietecan roman-eton *Okupacio* de la (denove estona!) verkisto Erni Krusten; la dua estis vera romano – preskaŭ kvincentpaĝa verkego *Nuda inter lupoj* de Bruno Apitz, orient-germana komunisto, kiu pasigis ok jarojn en la koncentrejo Buchenwald. Estis bona ekzercado por mi, sed la politika engaĝo kaŭzis al mi alergion al tia literaturo, kaj la tria libro legita de mi, estis ne vjetnama verko samloke aĉetita, sed *La Internacia Lingvo. Faktoj pri Esperanto* de Ivo Lapenna, kiu, danke al la kluba bibliotekistino Nadeĵda Ŝevaljova, kiu ĉiam pledis por riĉigo de nia kluba librokolekto, estis aĉetita el la klubanaj kotizoj.

En la kluba biblioteko troviĝis ankaŭ *La vojo returne* de Remarque, do ankaŭ la tria beletraĵo en Esperanto, legita de mi, temis esence pri milito, sed tio estis la fino de mia milita serio – Tibor Vaskó kaj Vilmos Benczik lanĉis en Budapeŝto amasan libroeldonadon en Esperanto por kontentigi la librosoifon en Orienta Eŭropo. Inter la unuaj libroj, finfine atingintaj Tjumenon, estis la legenda kaj leg-enda poemaro *Kvaropo, Koko krias jam!* de Ferenc Szilágyi, *Kain kaj Abel* de Sándor Szathmári kaj la antologio *25 jaroj*. Tiuj libroj, tre malsimilaj al la du menciitaj beletraj propa-gandaĵoj, nunue legitaj de mi, montris la mi la legindecon de la originala Esperanta li-teraturo, kaj de tiam mi dum deko da jaroj legis ĉiun aĉeteblan originalan beletraĵon.

Vi studis en la Industria Instituto en Tjumeno. Kiel okazis, ke diplomita inĝe-niero iĝis ĵurnalisto kaj redaktoro?

Jam en la Kamyŝlova mezlernejo mi kunredaktis la murgazeton de nia klaso kaj krome lanĉis kaj redaktis la murgazetojn *Sporto* kaj *Ĉirkaŭ la Mondo*, verkante por ili etajn raportojn kaj sportajn prognozojn, kaj per tio mi ekpraktikis ĵurnalismon, kvankam je tre primitiva “murkora” nivelo. Unu jaron post mia esperantistiĝo mi ek-verkis artikolojn pri esperantistaj eventoj por loka gazetaro, poste ankaŭ por Esper-anto-gazetoj. Tiusence mi ĵurnalistiĝis pli frue ol mi diplomiĝis kiel inĝeniero, kaj ĝis nun aperis ne malpli ol milo da miaj tekstoj, verkitaĵoj propranome, sensubskribe kaj pseŭdonime, sen kalkuli centojn da blogaĵoj kaj podkastaĵoj.

Kial, do, vi ne tuj elektis la ĵurnalistan profesion, sed laboris kiel inĝeniero?

Tio estas kompleksa problemo ne respondebla unufraze, sed mi provos listi la kialojn.


Unue, en la Tjumenia Universitato ne estis ĵurnalista fakultato, kaj nek mi, nek miaj gepatroj deziris ke mi loĝu aliorbe. Due, mi ja interesiĝis pri scienco kaj teĥniko, kaj kredis, ke mi estis bona inĝeniero en ĉiuj entreprenoj, kiuj dungis min. Trie, la “socisciencaj” studentoj kutime ne havis armeajn katedrojn en siaj universitatoj, kaj post la diplomiĝo ili devis servi en la armeo, dum la teĥnikaj studentoj kutime dum la studado studis ankaŭ la militarton kaj ricevis la leŭtenantan rangon; mi ne volis “perdi” unu jaron en kazerno.

Sed eble plej gravas la kvara kaŭzo. En Sovetunio la ĵurnalistoj povis labori nur kadre de la gvidlinioj de la komunista partio kaj ties junulara organizo – komsomolo. Por esperi je bona ĵurnalista kariero oni devus partianiĝi, kaj kiel studentoj en la ĵurnalistaj fakultatoj unuavice estis akceptataj komsomolanoj. Mi ne simpatiis kun la praktika komunismo kaj estis unu el la nemultaj tiamaj nekomsomolaj abiturientoj, do la kariero en la ideologia fako, kia estis la ĵurnalismo en Sovetunio, estis fermita por mi, kaj mi elektis studi en la pipelina fakultato, kaj ĝis 1991 ĵurnalismo estis mia hobiaĵo.

Cetere, al la ĵurnalismo mi pli kontribuis ne kiel aŭtoro, sed kiel redaktoro, ja nur por *La Ondo de Esperanto* mi redaktis pli ol dek mil divers-ĝenrajn tekstojn, kaj krome mi (kun)redaktis ankaŭ plurajn numerojn de *Ekzakte*, *Sezonoj* kaj *Ruslanda Esperantisto*, kompostis kaj enpaĝigis ilin, prilaboris milojn da publikigitaj bildoj ktp, ktp.

Ĉu kiel gazet-redaktoro vi sentas la influon, kiun vi per via laboro havas al la Esperanto-movado? Vi povas libere elekti viajn kunlaborantojn kaj kontribuantojn, per kio vi povas influi al ideoj, kiuj cirkulas en la movado. Same, vi povas per viaj lingvaj preferoj kaj kutimoj influi la lingvouzon de la legantoj. Ĉu estas tiel?

En la unua jarcento de Esperanto, la rolo de l' gazetaro estis ege grava, kaj la redaktoroj de la plej legataj gazetoj reale influis ideoj, lingve kaj organize al la esperantistaro. Ekzemple, nia samizdata almanako *Sezonoj*, lanĉita en 1984, tre baldaŭ iĝis kvazaŭ hejmo por aŭtoroj, kiuj, same kiel mi, la redaktoro, konceptis Esperanton ne (nur) kiel la lingvon de gajaj klubkunvenoj kaj tendaroj, sed (ankaŭ) kiel kulturlingvon. Subite ekfloris literatura vivo, aperis interesaj recenzoj kaj pikaj satiroj, kaj la lingvaĵo estis riĉa kaj suka, sed ne ĉiam komprenebla por la averaĝa movadano. Ĉiu numero estis eta festo por la kunlaborantoj kaj legantoj... Nun la gazetara influo estas malpli forta, ĉar multo okazas en la reto, kie, bedaŭrinde, la lingva nivelo kaj la intelekta diskutnivelo ofte estas malaltaj. La nuna *Ondo* ne povas havi tian fortan influon, kian havis *Sezonoj*, same kiel la revuo *Esperanto* ne plu havas la influon, kiun ĝi ĝuis en la intermilita periodo.



Prezentado de la unua kajero de *Sezonoj*: Jelena Grigorjeva, Aleksander Korjenkov, Sergej Verŝinin, Nikolai Lozgačev (Sverdlovsk, 1984)

Kio – krom la eldona teknologio – ŝanĝiĝis en *La Ondo* dum tiu kvaronjarcento, ekde kiam vi revivigis la magazinon?

La ĉefa ŝanĝo okazis en julio 1997, kiam *La Ondo de Esperanto*, (re)lanĉita en 1991 kiel dumonata soci-kultura gazeto, kuniĝis kun la primovada monata ĵurnalo *Ruslanda Esperantisto*. La nova gazeto, malkiel la du antaŭaj, celis la internacian legantaron. Inter la “novaj” aŭtoroj estis Bill Auld, Detlev Blanke, Fernando de Diego, István Ertl, Georgo Handzlik, Reinhard Haupenthal, Wolfgang Kirschstein, Andreas Künzli, Giorgio Silfer, Walter Ŝelazny – personoj tre malsamaj, sed konsentaj kunlabori en gazeto sendependa de influo de iu movada strukturo.

Tio sentiĝis tre baldaŭ: en 1998 pli ol duono de la abonantoj loĝis en Ruslando, sed en la lasta papera jaro 2016, nur 13% da abonantoj estis ruslandanoj, kaj en la unua senpapera jaro en Ruslando estis nur 9% da abonantoj.

Ĝi estas demonstra versio de la 74-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Beletre



Halina kaj Aleksander kunorganizis pli ol 50 esperantistajn renkontiĝojn kaj kongresojn en Uralo, inter kiuj estis ankaŭ la 4a Semajno de Esperanto en Sverdlovsk (1986).



Valentin Melnikov

Surfadas AlKo sur la Ondo
Ekde Uralo ĝis Baltio,
Videblas tio tra Rusio
Kaj plu, tra tuta vasta mondo.

Sed li ne estas vagabondo:
Kun bierkruĉ', sen apatio
Surfadas AlKo sur la Ondo
Ekde Uralo ĝis Baltio.

Retej', podkastoĵ, korespondo,
Kaj nova enciklopedio...
Do, sen bezon' pri asocio –
Ja vastas la amika rondo –

Surfadas AlKo sur la Ondo...



István Ertl

La tago likas...

La tago likas kaj la forfluintajn
horojn englutas sponge la nekonebla nokto.
Mi vigilas ĝis la dua, tria,
por kapti la momenton kiam glore,
piedpinte endefilas tiuj horoj,
de kiuj nur la mankon
ni sentas dum la tagoj plenŝtopitaj.
(La montriloj ĉiunokte ĉesas
plumarŝi sur la brakhorloĝa plato.)
Mi ĉiam endormiĝas antaŭ tio.



Gyula Illyés

Unu frazo pri la tiraneco

Tradukis **Giorgio Silfer**

Kie tiraneco,
tie tiraneco:
ne nur ĉe la bastono,
ne nur en la prizono,
ne nur ĉe pridemanda vokto,
ne nur kore de l' nokto
en gardokria vorto;
tie tiraneco,
ne nur la fumobskura
flirt' en l' akuzagreso,
en la konfeso,
mallibero Mors-mura,
ne nur la juĝe turpa
frida verdikto: kulpa!
tie tiraneco
ne nur de l' soldataro
krakpafa atentostaro,
je fajr', je tamburado,
kia de l' kadavro
enkava tiro,
ne nur sekrete
ekfaŭka pordo
elknara,
en flustra novaĝdiro
la buŝon antaŭfala
en silentofingro,
tie tiraneco
ne nur en kradotene
rigida mientrajto
kaj vane jam ĉi-ene
baraktanta vekrio,
silenton
larmar' mute nutranta
al akvofalo,
en elstara pupilo,
tie tiraneco,

ne nur la plandostara
stentoro en vivuoj,
en kantoj, en huraoj;
kie tiraneco,
tie tiraneco
ne nur en la fervore
aplaŭdaj polmofrotoj,
en klarion', opero,
egale fimentore
tondra en skulptoŝtono,
koloroj, bildsalono,
en ĉiu kadr' aparte,
jam penik-arte;
ne nur dum nokto dampe
glita en veturbruo,
tio,
halt' ĉe pordovolbo,
kie tiraneco, tie
jen disrampe
plu en ĉio,
ĉu jama malvia dio?
tie tiraneco
infanĝardene,
en la patra konsilo,
en la ridet' patrina,
kaj kia de l' infano
respond' al fremdlandano
ne nur en najla drato
ne nur en librobreto,
ol en drat' pli bone
en stultiga ripeto;

jen tie
 adiaŭkise,
 kie l' edzino mise:
 karul', je la kioma?
 surstrate en ĝisvoma
 salutgalimatio,
 en subite pli mole
 donita mana premo,
 kiel subite
 frostas vang' amatina;
 ĉar jam en amoplonĝoj,
 ne nur en konfesigo,
 sed eĉ en amdeklaro,
 en dolĉa vortebrio,
 kiel muŝo envina,
 ĉar en sonĝoj
 vi ne jam solas,
 tie en nupta lito,
 pli frue en sopiro,
 ĉar tio nur ja belas
 kio solfoje lias,
 kun li ĝiskuse,
 se vi kredis, vi amis,
 telere kaj englase,
 tio en nazo, enbuŝe,
 en frostoj kaj mallumo,
 ekstere kaj interne,
 kvazaŭ aperta ŝutro,
 haladzas putro,
 kvazaŭ en domo
 ie gasfluo sterne,
 se en vi mem parolas,
 jen, tiraneco rolas,
 en la imago
 vi ne malkunas,
 supre novas ĉielo:
 limstrio, kie sunas,
 minokampo; la stelo:
 fenestro gvata,
 kaj la svarmanta volbo
 nur unu laborkampo;
 tirane sonas
 el febro, el sonorilo,
 el pastro en humilo,
 el la predikado,

templo, parlament', kradoj:
 multaj estradoj;
 kaj vin palpebrumi,
 vin okulumi;
 kiel malsana
 rememor' kompana;
 radon vagonan aŭdi,
 neliberan alplaŭdi;
 monte kaj apudmare
 tion enspiri;
 sparkas la fulmo, nome
 en la subita
 ekbruo, lanterno,
 kaj korkonsterno;
 en la trankvilo,
 en katena tredo,
 en pluvegtorento,
 en ĝisĉiela krado,
 en ĉelmuron blanke
 fermanta surneĝado;
 jen gapas vin
 ĉu hundokule,
 ĉar ĉio enĉele estas,
 tie en la morgaŭo,
 en via penso,
 en movo kaj en senso;
 akvo laŭ fluo,
 vi sekvas kaj vi kreas;
 observas elfunele?
 li vidas vin spegule,
 gvate, vi kurus vane,
 vi mem vin kaptas mane;
 en la tabakaromo,
 en via ŝtofa framo,
 enguta kaj engluta
 ĝiskerne;

vi viglus, sed penso
 nur lia en la menso,
 rigardus, sed nur vidas,
 kion li vin albridas,
 jam ĉirkaŭardas
 arbar' el alumeto,
 ĉar jam vi suben ĵetis,
 sed ne surtretis;
 nun tia vin li gardas,
 fabrike, kampe, hejme,
 ne sentas vi, ĉu vivo,
 viand' aŭ pano,
 ĉu ami, ĉu pretendi,
 brakojn etendi,
 servutkatenon
 vi forĝis kaj surhavas;
 vi manĝas, li pli gravas,
 por li idon vi naskas,
 kie tiraneco,
 ĉiu eras en la ĉeno;
 el vi fetoras, kreskas,
 vi tiranece eskas;
 ĉu talpo en sunbrilo,
 ni blindas en malhelo,
 ni ritas en kamero,
 ajne en la Saharo;
 ĉar kie tiraneco,
 ĉio vanas,
 eĉ la kant', la plej fidela,
 kaj ajn vi faras,
 ĉar tie
 via tombo staras,
 li diras, kiu vi estis,
 eĉ via polv' lin servas.

Dialogo pri malpalaca esperantismo

de Probal Dasgupta

Mendita de Mikno, itala maldekjarulo

D-i-kn-o, D-ekjara I-tala Kn-ab-o

Pajaco, sintaksisto ofte kamuflita kiel leksikologo

Mikno, sur kulisa seĝo, senhalte notkajeranta



Dikno: Sinjoro pajaco, vi ne metis bildojn en tiun ĉi libron. Kial? Bildoj tre plaĉas al mi!

Pajaco: Ne diru, Dikno! Ĉu vi do ne vidis la bildon sur la kovrilo? Pentris ĝin Uday Dhar, kiu persone portis la libron al mi. Mi tuj insistis, ke li aŭtografu ĝin.

Dikno: La bildon? Per kia skribilo li subskribis sur la kovrilo?

Pajaco: Ne, kara, li aŭtografis la libron, ne la kovrilon. Li skribis sur unu el la blankaj paĝoj per tute normala globkrajono. Ĉu al vi plaĉas globkrajonoj?

Dikno: Ne, mi kutime skribas per tolboj. Sed mia frato Vikno preferas uzi kalaftojn.

Pajaco: Kio estas tolboj kaj kalaftoj?

Dikno (*rideskas*): Vi ne komprenas, sinjoro! Lasu tion. Jes do, kiaj estas la rakontoj en via libro? Mi promesis demandi vin kaj transdiri al Vikno. Li aŭdos de mi kaj poste decidos, ĉu legi ĝin.

Pajaco: Bone, Dikno, sed ĉu mi rajtas unue aĉeti glaciaĵon? (Li sukcese subaĉetas lin.) Jes, pri la rakontoj. Ĉu vi vidis la konversacion? Vi estas kiel Alico. Malplaĉas al vi libroj sen bildoj kaj sen konversacioj. Estas unu bildo sur la kovrilo de mia libro. Kaj enestas eĉ unu tuta konversacio!

Ĝi estas demonstra versio de la 74-paĝa junia Ondo. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de La Ondo de Esperanto legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Artikole kaj esee



En 2001 Aleksander Korĵenkov kun sia familio forlasis Azion kaj ekloĝis en la plej okcidenta Ruslanda regiono. En Eŭropo daŭris ilia agado, al kiu aldoniĝis, ekzemple, okazigo de gajaj Zamenhofaj Semajnfinoj kunlabore kun la Ĝenerala Konsulejo de Pollando en Kaliningrado.

Transformiĝoj

de Humphrey Tonkin

Mi ne scias precize kie mi estis la 23-an de majo, 1958. Verŝajne ĉe la lernejo, en la fina parto de la fina jaro. Dum tiu tempo la britaj universitatoj estis sieĝataj de kreskantaj nombroj da studentoj, kaj, kvankam oni ja akceptis min, la Universitato de Kembriĝo anoncis, ke mi devos atendi unu tutan jaron ĝis mi povos ekstudi tie komence de oktobro 1959. Kion fari dum (pli ol) tuta jaro?



Necesis perlabori la panon, do trovi iun postenon. Inter la eblecoj: trovi laboron eksterlande (kion mi trovis tre alloga), labori surloke kaj loĝi hejme en sudokcidenta Anglio, tiel ŝparante monon kaj komplikajojn. Mi fine kompromisis: mi trovis laboron en privata lernejo apud Londono. Mi tie instruos literaturon, historion kaj (Dio min ŝirmu!) religion. (Post unu trimestro oni silente forprenis de mi respondecon pri religio, ĉu pro herezo ĉu pro simpla nekompetento...)

Privataj britaj lernejoj tiuepoke ne estis lanternoj de enlumiĝo (esperantistoj legu la verkojn de Kenelm Robinson...), sed tiu ĉi lernejo estis sufiĉe proksima al Londono, ke mi povis en mia ĉiusemajna libera duontago viziti teatron, iri al koncerto, aŭ alimaniere eduke min amuzi en la granda urbo – kaj de tempo al tempo eĉ viziti la Londonan Esperanto-Klubon. Mi ja jam estis esperantisto – vizitis unu-du naciajn kongresojn, kaj eĉ la Universalan Kongreson en Kopenhago en 1956.

La fakto, ke mi laboros kiel instruisto, signifis, ke mia somero de 1958 estos tute libera. Mi decidis utiligi ĝin por denove iri al Universala Kongreso – en Majenco – sed ankaŭ al la tiujara junulara kongreso, en Homburg en la iama Sarlando.

Kvankam jam konvinkita Esperantisto, min plene kaptis por Esperanto tiu TEJO-kongreso: mi renkontis homojn el diversaj partoj de Eŭropo, amuziĝis, disputis, ludis, formis amikecojn kiuj daŭris jarojn. Esperanto fariĝis parto de mia vivo.

Mi ja ne sciis, ke tiutempe la juna Aleksandro tie en ankoraŭ alia parto de Eŭropo (reale, en Azio. – La red.) kriis siajn unuajn infanajn kriojn, singultis, bavis, ridetis...

Jes ja. Okazis multaj transformiĝoj en tiuj intervenaj sesdek jaroj.

Ĝi estas demonstra versio de la 74-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Esperanta kulturo kaj ĝia speguliĝo en la lingvo

de Ilona Koutny



Lingvo kaj kulturo

Lingvo kaj kulturo estas bazaj nocioj por la homa civilizo. **Kulturon** mi komprenas en vasta senco, t.e. ĉio kio ĉirkaŭas la homojn kaj ĉio kion homoj kreis. Do, ĝi inkludas la naturan ĉirkaŭaĵon, la elementojn de la ĉiutaga vivo kun ĝiaj kutimoj, la politikajn, religiajn ktp. instituciojn kaj la artajn verkojn (vd pli detale en Koutny 1998).

Lingvo estas komunikilo inter homoj, tiel ilo por formuli iliajn spertojn pri la mondo kaj transdoni ilin al la sekvaj generacioj, sed ĝi servas ankaŭ esprimi sentojn kaj por identiĝo. Ĝi evoluas dum la uzado en parolkomunumo, ĝi estas parto de la homa kulturo. Samtempe ĉiuj elementoj de la homa kulturo aperas en la lingvo, ni nomas la plantojn kaj bestojn ĉirkaŭ ni, la portatajn vestojn kaj la manĝaĵojn, la fonditajn instituciojn ktp., tiel la lingvo estas portanto de la homa kulturo kaj spegulas ankaŭ ĝiajn ŝanĝojn. Ni lernas kaj konas la mondon perhelpe de la lingvo. Eĉ se ni ne nomas ion, ĉar ĝi estas tabuo, ĝi havas sian lokon inter la nomitaĵoj.

Ĉu eblas disigi lingvon (en la senco de komunikilo inter homoj) de la kulturo? Eĉ se ĝi estas planita, kiam la lingva sistemo ekestas antaŭ la uzo? En la sekvaj linioj mi spuros, kiel kulturo trapenetras lingvon, kiel la spertoj de la parolkomunumo aperas ankaŭ en la lingvo esperanto, kiu estas kutime dua (aŭ tria, kvara) lingvo por ĝiaj parolantoj. Mi esploras, ĉu iu internacia kulturo karakterizas esperanton aŭ la fontolingvaj kulturoj speguliĝas en ĝi, eble la kulturo de la parolanto, kaj kiomgrade la lingva bildo de esperanto estas determinita per ĝia strukturo.

Lingva bildo de la mondo

Jam delonge sciencistoj (kiel Humboldt) konscias, ke la homaj mondovido kaj pensmaniero aperas en la lingvo, kaj ankaŭ nuntempe daŭras esploroj en tiu ĉi tereno (ekz. kadre de la etnolingvistika skolo de Bartmiński en Pollando). Popoloj, parolkomunumoj en diversaj partoj de la mondo iom alie interpretas la mondon, kaj mapas siajn spertojn pri la mondo malsame en siajn lingvojn. Tio kapteblas en diversaj lingvaj niveloj (gramatiko, leksiko).

La natura kaj socia ĉirkaŭaĵoj specifaj por donita popolo aperas en la leksiko, tiuj estas la t.n. **realioj** (specifaj elementoj de la realaĵo), temas pri nomoj de bestoj, plantoj, manĝaĵoj, vestaĵoj, institucioj ktp. Aziaj plantoj kaj bestoj ofte eĉ ne estas konataj por eŭropanoj, aliflanke, multaj eŭropaj institucioj kaj kutimoj estas nekonataj por afrikanoj aŭ azianoj.

Povas esti diferencoj ankaŭ en la **segmentado de la mondo** per lingvaj etikedoj. Ekz. multaj lingvoj (kiel hindeŭropaj) uzas du vortojn por arbo kaj ligno, sed por aliaj kiel la japana aŭ la hungara sufiĉas unu vorto (ja ligno estas nevivanta arbo!), por iuj lingvoj necesas distingi inter iri per piede (germane *gehen*) kaj per veturilo (*fahren*) kaj multaj similaj kazoj (vd Koutny 2018).

Ankaŭ en gramatiko aperas diferencoj: en iuj lingvoj ne nur vivuloj havas sekson, sed ion similan, genron, ankaŭ la objektoj kaj entute ĉiuj substantivoj, kio klasifikas ilin en malsamajn klasojn. Tio havas konsekvencojn al tio kiel oni vidas la mondon; same la traktado de tempo, uzo de pronomoj ktp.

La konstantaj esprimoj, la **frazologiaĵoj** konsistigas trezorejon de la speciala vidmaniero de iu popolo. Ofte oni komparas la homajn ecojn al tiuj de bestoj kaj plantoj – kiuj ja diferencas en diversaj kulturoj. Ĉu ĉie porko estas la simbolo de malpureco, maldeco, kaj serpento tiu de ruzeco? Ĉu rano estas pozitiva aŭ negativa figuro? En Azio tiuj bestoj havas alian simblan signifon ol en Eŭropo. Oni povas ankaŭ aludi al historiaj eventoj, personoj per iuj esprimoj...

Tutmondiĝo kaj Esperanta kulturo

Iam popoloj vivis aparte, izolitaj unu de la alia kaj iliaj kulturoj kaj lingvoj evoluis malsame, nuntempe la mondo ŝrumpis, oni parolas pri “tutera vilaĝo”. Dank’ al la moderna tekniko ni povas rapide atingi aliajn mondopartojn kaj ekscii tuj pri eventoj en tute malproksimaj lokoj. Kulturaj apartaĵoj kaj lingvoj komencas malaperi, multaj malgrandaj kulturoj kaj lingvoj estas endanĝerigitaj.

Esperanto havas **internacian parolkomunumon**, t.e. adeptojn el multaj landoj kun diversaj lingvoj kaj kulturoj. Ĉu ĝia kulturo estas internacia kaj kiel ĝi speguliĝas en la lingvo?

Estas malfacile difini, kion signifas **internacia kulturo**. Estas multaj bazaj aferoj, agadoj, sintenoj kiuj aperas en ĉiuj kulturoj, tamen ili surface aspektas alie. Ekzemple ĉie homoj manĝas legomojn, sed diversaj regionoj havas siajn karakterizajn legomojn; ĉie ekzistas geedziĝo, sed la roboj kaj la rilataj kutimoj diferencas. Povas malsami valorjuĝoj, ofte influataj ankaŭ de religio, kiel ekz. pri la rolo de virinoj kaj entute pri la rajtoj de individuoj kvankam jam de 1948 ekzistas la *Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj*.


Ĝi estas demonstra versio de la 74-paĝa junia Ondo. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Noblaj sovaĝuloj

de Trevor Steele



Mi kredas, ke Jean-Jacques Rousseau enkondukis la terminon “nobla sovaĝulo”. Li portretis homojn, kiuj restas (ankoraŭ) liberaj je la danĝera influo de civilizacio. Ja povas esti elementoj de vero en tia aserto. Mi mem diversloke konatiĝis kun “sovaĝuloj” (ridinda vorto!), kiuj vere estas ĉarmaj, malavaraj kaj helpemaj. Sed ne ĉiam estis tiel. Mi rakontu pri du situacioj.

* * *

En 1993-4 mi laboris kiel “eduka konsilisto” en Arnhem-Lando en la ekstremnorda parto de Aŭstralio. Tio estas rezervejo por aborigenoj kaj estas pli granda ol multaj landetoj de la mondo, sed havas loĝantaron de entute 14.000, el kiuj 95% estas aborigenoj, la ceteraj “blankuloj” kiuj servas kiel instruistoj, policistoj, medicinistoj, kaj kelkaj en la infrastrukturo. Mia tasko estis veturi centojn da kilometroj de Maningrida, marborda vilaĝo, kaj provi helpi la instruadon en tri-kvar ege malgrandaj vilaĝoj (“hejmlandoj”). Teorie mi estis dungito de la lernejo en Maningrida mem, sed fakte mi estis preskaŭ tute sendependa aganto.

Nu, unu el miaj vizitataj “hejmlandoj” estis Ng, loĝantaro eble 20. Iun tagon post la matena instruado mi planis amuzi la infanojn per kelkaj ludkartaj artifiko. Mi montris la kartaron sed tuj la plej aĝa infano kriis ion en la loka lingvo, kaj aldonis “debil!” (diablo) kaj ĉiuj infanoj forkuris de mi, kvankam ni kutime interrilatis tre amike. Posttagmeze mi volis iel mildigi la teruran sunvarmon per naĝado en la rivereto tuj apude. Mi surmetis mian naĝkalsoneton kaj naĝis. Poste mi ree vestis min “normale”. Sed eble tri-kvar fojojn dum la longa posttagmezo mi naĝis, kaj la lastan fojon mi forgesis sanĝi la vestojn: mi restis en la naĝkalsono. Vespere estis ia amuzaĵo sur la eta korto en la mezo de la “vilaĝo” kaj mi iris tien kunĝui. Mi eĉ ne rimarkis, ke kelkaj virinoj malaprobe rigardas miajn vestojn.

Ĝi estas demonstra versio de la 74-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Kiu efektive konkuras kun UEA?

de Grigorij Arosev

En la unua dekada de majo diskoniĝis la informo, ke la estraro de UEA volas kvaroble altiĝi bazan kotizon – de 11 ĝis 44 eŭroj por Nederlando kaj aliaj eŭropaj landoj. Kompreneble, aldonante nenion el la servoj (eĉ male, ion forstrekante – almenaŭ la paperan Jarlibron/Gvidlibron). Se la propono oficialiĝos, membroj ricevos malpli da servoj kontraŭ kvaroble pli da mono. En la “granda” mondo oni apenaŭ kredus, ke tiaj proponoj entute povas aperi, sed en la esperantista rondo familia ĉio eblas.



Mi ja konscias, ke ĝis nun la propono sonis nur kiel ideo kaj eble oni malakceptos ĝin. Sed esence tio malmulton ŝanĝos.

UEA ne havas tion, kion havas preskaŭ ĉiuj aliaj organizoj kaj entreprenoj en la mondo: konkurencon. Alternativetoj por UEA estas jen ĉiam malpopulara SAT (sed reale ĝi estas ne alternativo, sed eventuala aldono, same kiel pluraj aliaj fakaj asocioj), jen la komika Civito, kies agoj daŭre estas ege amuzaj, sed pri kiuj oni jam laciĝis moki.

Sola konkuranto, kiu efektive maltrankviligas Universalan Esperanto-Asocion, estas sinjoro Konscia Nerembriĝo. Ĝi estas tre forta konkuranto, sed ankoraŭ ne morte grava. Multaj ja supozeble pensas: “Ba, mi ne ŝatas la nunajn okazintaĵojn en UEA, sed mi estas konscia esperantisto kaj subtenos la asocion plu, ja kotizo estas malgranda”. Ankaŭ mi pensas tiel. Sed evidente UEA ne plu volas havi tiom da lojalaj membroj.

Nun UEA anstataŭ danki, volas devige je nia kosto solvi siajn problemojn. Mi ripetu mian tezon, skribitan en la interreto: sendube UEA rikoltos samtiom da mono, kiel antaŭe, sed havante kvaroble malpli da membroj. Bone: eble trioble. Ne pli. Ĉiuj ni legas pri defcito en la kaso, defcito en la estraro, defcito en la CO, defcito en la ideoj. Sed proponita solvo aspektas primitive kaj komike: vi pagu, ni plu regos.

La situacio, kiun spertas UEA, estas ĉiukonate malfacila. Fakte la asocio daŭre restas sub la minaco de bankroto. Memkomprenebla paŝo ĉi-okaze estus tuja demisio minimume de prezidanto kaj estrarano pri financo, kiuj en la sekva kongreso eble povus rekandidatiĝi. Se tion ne permesas regularo, oni povus elpensi alian vortumon por tiu ago, ekzemple prezidanto petus la komitaton voĉdone esprimi

konfidon aŭ malkonfidon, kaj se malkovriĝus malkonfido – jes, demisius, post kio oni laŭregule elektus novajn gvidantojn. Bedaŭrinde tiel ne okazis kaj apenaŭ okazos.

Inter 2010 kaj 2013 mi prezidis Rusian E-Union. Tiu tempo estis movade malfacila el pluraj vidpunktoj, mi ne sukcesis fari ĉion planitan (tamen notu, ke mi tion agnoskas), sed unu aferon mi vidis tute klare: membroj de jaro al jaro perdas kialojn por membriĝi. Tial mi proponis enkonduki novan membrokategorion, nomiĝantan “Amiko de REU”. Ĝi ekzistas ĝis nun, tial oni parolu pri ĝi en prezenco: “Amiko de REU” pagas nenion, la sola kondiĉo por membriĝi estas mencio de ekzistanta retadreso. Kiel servon la homo ricevas elektronike Bultenon de REU kaj aliajn informojn (sed nek voĉdonrajton, nek iujn rabatojn). La ideo estis ja bona, nur bedaŭrinde por varbado mankis homaj fortoj, pro tio “amikoj” ĉiam estis malpli multaj ol la regulaj membroj.

Mi firme certas, ke UEA bezonas ne altigon de kotizoj, sed ion similan. Verŝajne tamen ne tute senpagan membrokategorion. Sed nepre malmultekostan, kiu estus alloga por tiuj, kiuj malmulte interesiĝas pri UEA mem, sed jes, simpatias kun Esperanto, la movado kaj (kial ne) certaj personoj en la estraro/komitato. Jes, oni povas ĉiujn servojn fari virtualaj, kaj ankaŭ fari malpli signifan rabaton por la libroservo (ju pli multe pagas homo por membreco, des pli altan rabaton li ricevas – tio estas logika ago). Sed lasi al esperantistoj eblecon senĝene subteni UEA. Kvarobla altigo de kotizo garantias, ke por multaj la subteno ne plu estos senĝena.

Krome, sur la loko de UEA-prezidanto mi sendus personan mesaĝon (certe aŭtomate kreitan, sed egale personan) al ĉiuj membroj de malmulte- kaj mezkostaj kategorioj, kie skribus: „Kara, ni aprezas vian daŭran membrecon. Sed la financa situacio en la asocio estas malfacila, pro tio ni petas vin, se vi trovos tion por vi ebla, membriĝi tra pli kosta kategorio aŭ fari etan mondonacon, eĉ se samgrandan kiel via kotizo. Tio multe helpos nin. Kompreneble vi havos eblecon daŭre membriĝi tra via kutima kategorio“.

Probable mi estas tro naiva, sed mi volas kredi, ke tio donus pli da efiko ol deviga altigo de la kotizo. La movado daŭre suferas sian plej aĉan malsanon: kompletan foreston (aŭ mankon) de “homa rilato”. Gvidantoj ŝajne forgesas, ke ni estas ne unue esperantistoj kaj poste homoj, sed inverse. Ni ja membriĝas kiel esperantistoj. Sed ne remembriĝas jam kiel homoj.

El gratuloj...

Mi elkore dankas Aleksander (kaj Halina), ke ili kuraĝas dediĉi sin al la riska entrepreno eldoni magazinon en la lingvo, kiu plej bezonas tian periodaĵon. Plenan sukceson al la laboro!

Trevor Steele

La Esperanta printempo de Madrido 1980: Kazostudo pri unu nova lernanto de Esperanto, kun merkatakaj kaj edukadaj komentoj



de Dennis Keefe

Multe da esperantistoj lingve naskiĝis pro la vigla informado kaj instruado de sen-nombraj lokaj kluboj de Esperanto. Tia estis mia kazo kaj eble la via, speciale se vi lernis Esperanton antaŭ la ekflorado de la interreto. Mia sperto okazis en Madrido en la printempo de 1980. Verŝajne tiu de Aleksander Korĵenkov kaj tiuj de tiom multaj el niaj veteranaj esperantistoj okazis samepoke, similmaniere. Pensante pri mia sperto kaj tiu de Aleksander kaj miloj aŭ dekmiloj da aliaj esperantistoj de tiu epoko, mi volas detale priskribi mian Esperantan travivaĵon en MEL, la Madrida Esperanto-Liceo, provante trovi merkatakajn kaj edukajn erojn de tiu sperto kiu eble ankoraŭ validas kaj valoras hodiaŭ en la interreta epoko de Duolingo, Amikumu kaj la sociaj retoj. Kiajn lecionojn pri merkato kaj instruado ni povas eltiri el la antaŭ-interreta epoko? Mi rakontos la Esperantan ekvivon kiun mi plej bone konas, mian, kun la espero, ke tia sperto iel similas ankaŭ tiujn de la aliaj longdaŭraj lernantoj de nia lingvo. Mi komencu.

Antaŭ mia hazarda ekkono de la ekzisto de la klubo de Esperanto en Madrido, MEL (Madrida Esperanto-Liceo), mi studis ĉe la Universitato Complutense de Madrido, loĝante en studenta loĝejo nomata Colegio Mayor San Agustín, en la strato nomata Avenida de Seneca. Je distanco de 250 metroj, ĉe la sama strato, estas alia studenta loĝejo nomata Teresa de Jesús. Antaŭ kelkaj tagoj, mi ĵus eksciis, ke la ĉi jara Landa Kongreso de Hispanio, kaj la ILEI-Konferenco kune kun sia Lingva Festivalo okazos ĝuste en tiu dua studenta loĝejo. Kun 38 jaroj da diferenco, mi revenas al la kvartalo kie mi loĝis kiam mi eklernis Esperanton!

Ĝi estas demonstra versio de la 74-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Ponto por interŝanĝo de kulturaj valoroj

de Georgi Mihalkov



La problemo pri la interŝanĝo de kulturaj valoroj en la multetna Eŭropo estas tre aktuala. En la nuna mondo ege disvastiĝas la kultura interŝanĝo, sed tre grave estas, ke la etnoj en la Eŭropa Unio konservu sian identecon kaj daŭrigu sian kulturan evoluon. La Eŭropa Unio iĝos pli prospera, se ĝi sukcesos konservi la variecon de la etnaj kulturoj. Tiam la eŭropa kulturo iĝos pli kolora kaj pli riĉa.

Nun la plej grava tasko de la eŭropaj landoj kaj la etnoj en tiuj ĉi landoj estas pli bone ekkoni la diversajn naciajn kulturojn. Dank' al la interŝanĝo de la kulturaj valoroj inter la eŭropaj landoj, la eŭropanoj sukcesos ekkoni la morojn kaj la tradiciojn de la homoj, kiuj loĝas en la diversaj landoj kaj tio helpos por la ilia unuiĝo, ilia amika kunvivado kaj libera interŝanĝo de kulturaj kaj materiaj valoroj. Estas ĝenerala vero, ke nur dank' al la evoluo de la homa kulturo la homoj pli bone povus kompreni unu la alian.

La eŭropaj landoj jam devas trovi novajn eblecojn al kunlaboro kaj unu el la vojoj, kiuj gvidas al amikeco kaj paca kunezisto, estas la kulturo, la ekkono de la riĉaj kulturaj valoroj de la diversaj landoj kaj etnoj.

Ĉiu eŭropa lando evoluis laŭ sia specifa kultura vojo, kreis siajn kulturajn valorojn. La natura deziro de la homoj estas ekkoni la historion, la kulturon, la vivmanieron de la homoj, kiuj loĝas en aliaj landoj.

La plej granda barilo antaŭ tiu ĉi natura homa emo estas la diversaj lingvoj. La homoj, parolantaj diversajn lingvojn, ne komprenas unu la alian kaj rilatas malamike unu al alia. Ili rigardas suspekto al la nekonataj homoj, kiuj parolas nekompreneblan por ili lingvon kaj tio ne nur malproksimigas, sed timigas la homojn.

Pro tio Esperanto, la lingvo internacia, estas la plej unika rimedo por la interŝanĝo de kulturaj valoroj en la multetna Eŭropo. Esperanto estas la mirakla ponto dank' al kiu la homoj el la diversaj eŭropaj landoj povas pli bone ekkoni la kulturajn valorojn de Eŭropo kaj pli efike kunlabori.

Ĝi estas demonstra versio de la 74-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Tiuj ĝenaj homonimoj homogenaj

de Sergio Pokrovskij

Ĉiam ĝenis min la neoficiala prefikso *homo-*, kiu en Esperanto kolizias kun la fundamenta vorto «homo»: *homogena* neniel rilatas al la «homaj ĝenoj», nek al «de la homo produktitaj» (EN anthropogenic); simile pri «homologa», «homografo», «homofono» ktp. Se «patronimo» (EN patronym) estas scienca termino por «patronomo», tiam «homonimo» eble povus esti «homonomo» (EN anthroponym)?



Jen amuza ekzemplo el la Esperanta [Vikipedio](#) (tiel je 2018-03-05):

*Konsonantoj kiuj havas la saman lokon de artikulado ... nomiĝas
homorganaj.*

(Angle: [homorganic consonants](#).)

Laŭ PIV,

homol. Grekdevena vortero en la komenco de sciencaj vortoj, kun la signifo «sama».

Ĉar ĉi tiu prefikso sence kaj etimologie parencas al *sam-*, tial la plej bona solvo estas uzi (kie eblas) la propre Esperantajn vortofarajn rimedojn: *samnomulo* anstataŭ la franca «homonyme» en la senco RU тѣзка, EN namesake (ekz-e «il est votre homonyme»). Sed por la terminoj lingvosciencaj kaj ĥemiaj tio ne bone funkcias.

(La ĥemia signifo estas pli speciala, ĝi estas mallongigo de *homogena*; ekz-e *homopolimero*, *homopolisaĥarido*.)

Mirinda afero estas, ke la solvo estas tute evidenta kaj tamen ignorata: forigi la malnecesan komencan *h*, mutan en ĉiuj lingvoj latinidaj, ne ekzistantan en la greka, rusa, itala:

BG ОМОНИМ

EL ομόνυμο

IT omonimo

RO omonim

RU ОМОНИМ

UK ОМОНИМ

(Estkiel programisto mi ĉiam aparte ŝatas la ĝustigojn faratajn per forstreko de troaĵo.)

(Estas fenomeno mirinda ke la ekstermantoj de la litero ĥo neniam provis forigi la malpli internacian parolsonon [h].)

Dum jardekoj mi ne parolis pri tio, sed antaŭ nelonge mi vidis citaĵon el teksto fare de *René de Saussure*, «Saussure, — la pura, klara Mens'»¹:

DE SAUSSURE en 1908 estis “Ĝenerala Sekretario” de ISR. Li i.a. konsilas “la uzon de kelkaj novaj sufiksoj por pliprecizigi la sencon de la teknikaj vortoj, ekzemple -oz, -iz, -iv, -if, -ojd”.

(...) Ĝis nun la teknikaj vortaroj estis verkitaj de apartuloj kaj sen ia ligo unuj kun la aliaj. Tia ligo estas nepre necesa por ricevi teknikajn vortarojn laŭ **omogena** plano. Aliflanke, ĉiu faka vortaro devas esti verkita de specialistoj.²

Pli moderne, mi vidas la uzon de la vorto *omogena* en teksto verkita de italo:

la aparatoj por la *omogena* disdivido de la bremsforto ĉe tre longaj vartrajnoj [*Itala Fervojoisto*, 2005:12 (2), p.31]

Simile mi vidis uzojn de *omonimo* fare de esperantistoj rusiaj (ekz-e ĉi tie).

«Homonimo» estas oficialigita en OA1. «Homogena» estas vorto neoficiala (kvankam ja Zamenhofa). Tioj estas faktoj bedaŭrindaj, tamen ili ne malebligas uzi la «neologismojn» *omogena*, *omonimo*, *omoorgana*, *omopolimero* ktp.

1. Kolomano Kalocsay, *Rimportretoj*.

2. *Internacia Scienca Revuo*, Feb. 1908:5:2 (50), p. 62–64;

la kursivo estas mia — S.P. (Citite laŭ B.Pabst: BK IV, p. 108.)

Okaze de mia sesdeka naskiĝdatreveno mi ricevis rekte, telefone, retmesaĝe, en sociaj retoj kaj alimaniere tre multajn gratulojn. Mi tre ŝatus respondi persone al ĉiu gratulinto, sed, ĉar la respondado plenigus tre multe da tempo, mi, bedaŭrinde, ne povas fari tion kaj restas al mi nur esprimi mian dankon al ĉiu bondezirinto per gazeta dankesprimio. Koran dankon!

Aleksander Korĵenkov

Rakontu al infanoj pri Holokaŭsto!

de Stanislavo Belov

The Boy in the Striped Pyjamas (*La knabo en striita piĵamo*), dramo, Usono/Britio 2008, reĝ. Mark Herman



Holokaŭsto estas inter la plej bone esploritaj (historie kaj arte) tragedioj, tiukampe komparebla nur kun la armena genocido. Haveblas pluraj rememoroj (inkluzive en Esperanto), studaĵoj kaj filmoj. Ŝajnas ke jam malfacilas diri ion novan sen regurdi jamajn kliŝojn. Tamen la filmo sukcesis fari tion, kvankam ĝi estas tre simpla kaj apenaŭ havas elstaran artan valoron. Ĉu oksimoro? Mi klarigu.

Atentokapta kaj simpla

La prezentata historio estas tre simpla. Nazia Germanio, proksimume la jaro 1944. La 8-jara germana knabo Bruno kun sia patrino devas sekvi la patron – altrangan SS-oficiron, kiu ricevis novan postenon en fora regiono de la Tria Regno. Tie atendas ilin granda griza domo, el kies fenestro la knabo rimarkas strangan “bieron” kun pluraj homoj en striitaj piĵamoj. Lia demando pri tiu loko maltrankviligas la gepatrojn, kiuj solvas la problemon tre simple – blokas la fenestron kaj malpermesas al la filo lasi la korton.

Bruno kaj lia 12-jara fratino enuas en tiu morna senelirejo, kie ili mem similas al prizonuloj. Sola eksterulo estas duonviva hejma servisto el tiu “bieno”, kiun rigore traktas patra subulo, juna SS-oficiro. Lernejon anstataŭigas vizitanta ilin instruisto, kiu koncentriĝas ĉefe je la naziisma propagando, kiu influas la knabinon, sed apenaŭ interesas la okjarulon, kiu interesiĝas precipe pri ludoj kaj aventuroj, kaj nomas sin esploristo.


Dum sia esplorado li iras al la malpermesita loko kaj renkontas knabon en striita piĵamo – la samaĝan judon Ŝmuel, kiu malĝoje sidas surtere malantaŭ pikdrata barilo. La knaboj amikiĝas kaj komencas renkontiĝi tiel ĉiutage por babili kaj ludi.

Ĝi estas demonstra versio de la 74-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Bibliografie



Ni publikigas la duan parton de la bibliografio de Aleksander Korĵenkov. La listo, kiun vi trovos en la sekvaj 17 paĝoj, kovras la tekstojn de A.K. en *La Ondo de Esperanto*. La unua parto, kiu aperis en la maja numero, enhavis informojn pri libroj (inkluzive de bitlibroj, kontribuoj de A.K. al kolektoj kaj libroj redaktitaj de A.K.) kaj ĉio pri A.K. (intervjuoj, recenzoj, artikoloj). (Foto: 85a Brita kaj 98a Skota Kongreso de Esperanto; Glasgovo, 2003)

Bibliografio de Aleksander Korĵenkov (2)

Ni aperigas la duan parton de la bibliografio, kiun ni komencis en la maja numero. Nun sekvas la listo de la verkoj de Aleksander Korĵenkov aperintaj en *La Ondo de Esperanto*.

1991

La Ondo // LO, 1991, №1.

1992

Ĉu la muzoj silentu? // LO, 1992, №1.

Sep demandoj al Talis Bêrcis // LO, 1992, №1. – [Intervjuo].

REA fondita // LO, 1992, №1.

Omaĝe al Karolo Piĉ // LO, 1992, №1.

Nia gasto — prezidanto Lozgaĉev // LO, 1992, №2. – [Intervjuo].

La dudek-sesa // LO, 1992, №2. – [“La majstro kaj Margarita” en la serio “Oriento-Okcidento”].

Ne ĉio nova estas bona // LO, 1992, №2. – [Recenzo: “Nova Esperanta Krestomatio”].

Brjusov V. Nun, kiam mi vekiĝis / Trad. el la rusa // LO, 1992, №3.

Gazeto por ĉiu esperantisto // LO, 1992, №3. – [Intervjuo kun A. Birjulin].

Dankon pro la subteno // LO, 1992, №4.

Jacques Louis Mahé // LO, 1992, №4.

Ve al la “venkintoj” // LO, 1992, №5-6.

Drezen E. En batalo por SEU / Trad. el la rusa // LO, 1992, №5-6.

1993

Ni daŭrigas // LO, 1993, №1.

Kiu reprenos la stafeton? // LO, 1993, №1 – [Pri E-eldonejoj].

“Tamen restas io en memoro...” // LO, 1993, №1. – [Nekrologo de A. Apollo].

Nia libromerkato en 1992 // LO, 1993, №2.

Kio post la moskva sangobano? // LO, 1993, №3-4.

Ankoraŭfoje pri la esperanta gazetaro // LO, 1993, №3-4.

Foriris amiko. Johannes Palu (1913–1993) // LO, 1993, №3-4.

Ruslando post la decembra balotado // LO, 1993, №5-6.

1994

Korĵenkov A., Lozgaĉev N. Enirante en la trian jaron... // LO, 1994, №1.

Esperanta libromerkato en 1993 // LO, 1994, №1.

Li revenas... // LO, 1994, №2. – [A. Soljĵenicin revenis al Ruslando].

Kabarete ĉe Danubo // LO, 1994, №3-4. – [13a ILF en Bratislavo].

Boris Tokarev. 1927–1994 // LO, 1994, №5-6.

1995

Librojn legu la leganto // LO, 1995, №1. – [E-libroproduktado en 1994].

Amo en poezio kaj en prozo // LO, 1995, №3-4. – [14a ILF en Gdansko].

Jean Thierry. 1924–1995 // LO, 1995, №3-4.

La sonorilo de la Sankta Ana tintinas sen vi // LO, 1995, №5. – [Nekrologo de K. Piĉ].

1996

Inter tradicioj kaj nuntempo // LO, 1996, №1. – [La kvina jaro de LOde].

Ĉiu povas mem eldoni ĉiujn necesajn verkojn // LO, 1996, №1. – [E-libroproduktado en 1995].

Manifesto el Prago kaj mortosciigo el Torino, kiuj skuis Esperantujon // LO, 1996, №4-5.

Ni rajtas ne perdi la esperon // LO, 1996, №6. – [Antaŭ kvin jaroj malaperis USSR].

1997

Vicatendi por libroj // LO, 1997, №1. – [E-libroproduktado en 1996].

UEA: Ĉu membrokrizo? // LO, 1997, №2.

Finfine... // LO, 1997, №3. – [Pri la transformiĝo de LOde kaj RE].

Sub la roterdama lupeo: Korekto en la pasintkajera artikolo // LO, 1997, №3.

Gorecka H., Korĵenkov A. Al la legantoj // LO, 1997, №4.

Esperanto post la jaro 2000 (3) // LO, 1997, №4. – [Daŭrigo de la studo, komencita en RE].

.Vladimir Izosimov – 50-jara // LO, 1997, №4.

Literatura Foiro, 1997, №167 // LO, 1997, №4.

Gorecka H., Korĵenkov A. Al la legantoj // LO, 1997, №5.

Ne pesimisme, sed esperige // LO, 1997, №5. – [Eŭropo-Azio' 97].

Esperanto post la jaro 2000 (4) // LO, 1997, №5. – [Daŭrigo].

Laborkunveno pri informado // LO, 1997, №6.

“Kvankam ni ne kutimas...” // LO, 1997, №6. – [Komento al letero de leganto].

Esperanto post la jaro 2000 (5) // LO, 1997, №6. – [Fino].

[La ludoj kun la tempo kaj spaco...] // LO, 1997, №6. – [Postparolo al “Tri versioj de Judaso” de Borges, trad. F. de Diego].

Ivo Lapenna: Triumfo kaj fiasko // LO, 1997, №7.

1998

Niaj jubileoj kaj datrevenoj en 1998 // LO, 1998, №1.

Gazetaj pertrurboj // LO, 1998, №1. – [Poŝtaj perdoj].

Laduŝkin S. Klariga noto / Trad. el la rusa // LO, 1998, №1.

Libroproduktado en Esperantujo: jaro 1997 // LO, 1998, №2.

Ruslanda kaj ruslingva // LO, 1998, №2. – [RE iĝis ruslingva gazeto pri Eo].

Kune fronti problemojn tutesperantuje gravajn // LO, 1998, №3.

Gazetoj // LO, 1998, №3.

Pli da kunlaboro por la landa kongreso // LO, 1998, №4.

UEA ĉe nadiro? // LO, 1998, №4. – [Membrostatistiko de UEA en 1998].

Gazetoj // LO, 1998, №4.

O. R. Ganizov. Prteparu vin al la Fina Venko // LO, 1998, №4.

Ĝi estas demonstra versio de la 74-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Se en via lando estas peranto de *La Ondo de Esperanto*, pagu al tiu en via landa valuto. Ni havas perantojn en pluraj landoj. Vidu la liston de la perantoj ĉi-sube.

Se vi havas konton ĉe UEA, sendu ĝirilon por 15 eŭroj al la Centra Oficejo de UEA (Roterdamo), kopie al nia redakcia adreso rete (sezonoj@kanet.ru) aŭ poŝte (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando – Россия). Nia UEA-konto “avko-u”.

Vi povas uzi la internacian monpagan sistemon PayPal, vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Ruslandanoj pagu 750 rublojn al Галина Романовна Горецкая poŝte (RU-236039, Калининград, аб. ящик 1205), banke (petu informojn pri la kontonumero). Ni akceptas pagojn ankaŭ per Яндекс.Деньги (konto 4100138523456, informu retpoŝte pri la pagonumero), vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>.

Perantoj de *La Ondo de Esperanto*

Argentino: Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla — 52, CP 5507 — Vistalba, Luján de Cuyo Mendoza. Rete: rosar@fibertel.com.ar.

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016. Rete: libroservo@ans.com.au.

Aŭstrio: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg. Rete: aon.913548977@aon.at.

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-902 Brasília-DF. Rete: bel@esperanto.org.br.

Britio: EAB/Viv O'Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Rete: eab@esperanto.org.uk

Bulgario: Georgi Mihalkov, «Nadejda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-29001 Poděbrady III. Rete: Cea.polnický@quick.cz.

Ĉinio: Trezoro Huang Yinbao, Esperanto-Centro, Jinqiao Touzi Gongsi, Jingchuan-Xian Nonglin-lu, Pingliang Gansu, CN-744300. Rete: agrikulturo@126.com.

Danlando: Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø. Rete: arne-casper@email.dk.

Estonio: Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: ahto.siimson@esperanto.ee.

Finnlando: EAF / Paula Niinikorpi, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki. Rete: paula.niinikorpi@gmail.com.

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: libroj@esperanto-buecher.de.

Hispanio: Pedro A. Garrote, C/Las Mercedes, 5-5°-C ES-47006 Valladolid. Rete: hisperanto.uea@terra.com.

Hungario: Esperanto-Centro Eventoj, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

Irlando: Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W. Rete: noviresp@eircom.net.

Islando: Islanda Esperanto-Asocio, p. k. 1081, IS-121 Reykjavík. Rete: esperant@ismennt.is.

Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: f-esp-it@libero.it.

Japanio: Japania Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

Katalunio: Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008 E-08204 Sabadell, Katalunio. Rete: v.sole@esperanto.cat.

Koreio: KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703. Rete: kea@esperanto.or.kr.

Kroatio: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Rete: mbelosev@public.carnet.hr.

Latvio: Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga. Rete: margarita.zelve@gmail.com.

Litovio: Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

Meksiko: Mallely y/o Magdalena Martínez Mateos Av. 523, No.187, 1a Sección de San Juan de Aragón, Del. Gustavo A. Madero, México D.F., CP 07969, México. Rete: ondo@esperanto-mexico.org.

Nederlando: Univerala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Rete: ionel@co.uea.org.

Norvegio: Anne Karin Bondhus, Morenefareet 8 A, NO-4340 Bryne. Rete: akbondhus@jkn.no.

Nov-Zelando: G. David Dewar, PO Box 35849, Browns Bay, Auckland NZ-0753. Rete: gddewar@ihug.co.nz.

Pollando: Pola Esperanto-Asocio, ul. Andersa 37/59a, PL-00-159 Warszawa. Rete: sekretario@esperanto.pl.

Ruslando: Галина Романовна Горещкая, 236039, Калининград, аб. ящик 1205. Rete: sezonoj@kanet.ru.

Serbio: Miomirka Kovačević, Španskih boraca 32, RS-11070 Novi Beograd. Rete: miomirka.kovacevic@gmail.com.

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin. Rete: revuo@stonline.sk.

Svedio: Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, SE-931 38 Skellefteå. Rete: leif.holmlund@telia.com.

Svislando: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen. Rete: ch_scheidegger@bluewin.ch.

Usono: Esperanto-USA, P.O.Box 1129, El Cerrito CA 94530. Rete: elna@esperanto-usa.org.

Neniam sendu monon en kovertoj!

**30-a Internacia
Esperanto-Konferenco**

Temo:



ESPERANTO EN ARTOJ

**21-a ĝis 27-a julio 2018
en kastelo Grésillon (Francio)**



**Riĉaj prelegaj, kultura
kaj turisma programoj**

**Pliaj informoj kaj aliĝiloj ĉe:
osiek.org/iek**



LIPTOVSKÝ MIKULÁŠ (SK)

14 - 22 JULIO 2018

Venu sperti la plej mojosan someran Esperanto-lernejon!

Somera Esperanto-Studado (SES) estas semajna somera internacia lernejo de Esperanto por kaj komencantoj kaj progresintoj kun riĉa distra programo.

► Por informoj kaj aliĝo vizitu:

<http://ses.ikso.net>



103-a Universala Kongreso de Esperanto

Lisbono, 28 julio - 4 aŭgusto 2018

